# KUN KIES...?

**Refleksiva pronomo** laŭ la Cseh-metodo.

## I-a paŝo

*Sidas 2 virinoj kaj 2 viroj antaŭ kursanoj. Ĉiu el ili tenas iun objekton.*
*La instruisto montras kaj diras:*

Instruisto: Ŝi (Alino) sidas kun sia sako.
Instruisto: Ŝi (Janino) sidas kun sia libro.

*La instruisto montras kaj demandas*:

Instruisto: Ĉu la sako estas mia? Via? Ĉu la libro estas mia? Via?

*La kursanoj respondas negative ĉiun demandon.*

Instruisto: Kun kies sako sidas ŝi? (Alino).
Kun kies libro sidas ŝi? (Janino).
Respondoj.

## II-a paŝo

*La virinoj ŝanĝas la objektojn inter si.*
*La instruisto montras kaj demandas.*

Instruisto: Kun kies sako sidas ŝi? (Janino).
Kun kies libro sidas ŝi ? (Alino).
Ne uzu nomojn nur diru: "***ŝi kun sia***", aŭ „***ŝi kun ŝia***".
Respondoj.

## III-a paŝo

*La instruisto montras kaj diras:*

Instruisto: Li (Marko) sidas kun sia aktujo.
Li ( Antono) sidas kun sia horloĝo.
Ĉu la aktujo estas mia? Via?
Ĉu la horloĝo estas mia? Via?
Respondoj.

*La instruisto montras kaj demandas.*

Instruisto: Kun kies aktujo sidas li? (Marko)
Kun kies horloĝo sidas li? (Antono).
Kursanoj respondas .

**IV-a paŝo**

*La viroj ŝanĝas inter si la objektojn.*
*La instruisto montras kaj demandas:*

Instruisto: Kun kies aktujo sidas li?
Kun kies horloĝo sidas li?
Ne uzu nomojn nur diru:" ***li kun sia***” aŭ „***li kun lia***".

**V-a paŝo**

*Diversaj objektoj faciligas diferencigon.*
*Kiam la kursanoj jam komprenas refleksivon, oni povas doni al la rolantoj identajn objektojn, sed je malsamaj koloroj.*
*Tiam estas pli da eblecoj:" ĉiu ŝanĝas objekton kun ĉiuj".*

**Ŝi** (Alino) kun sia, ŝia, lia, lia
**Ŝi** (Janino) kun ŝia, sia, lia, lia
**Li** (Marko) kun sia, ŝia, ŝia, lia
**Li** (Antono) kun lia, sia, ŝia, ŝia

*kaj pare*

**Ili** kun siaj, ŝia, lia, ilia, iliaj

**VI-a paŝo Ripeto**

*La instruisto nur montras la personon kaj la objekton kaj la kursanoj respodas uzante nur pronomojn.*
*Por memorigi la refleksivon oni povas rakonti la konatan ŝercon pri ŝtelisto, aŭ kokranta edzo, edzino,se la kursanoj estas maturaj.*